



# Proverboj en Esperanto Uzoj kaj interpretoj

(91-a UK — Esperantologia Konferenco)



- Enhavo de la referaĵo
- Ilustrado per ekzemploj
  - Kiu materialo haveblas en la reto?
  - Kio estas proverbo?
  - Kiucele uzebla?

- La sinsekvaj eldonoj de la Z-a Proverbaro
  - 1910/1925
  - 1961/1974: Camille Rogister
- Laŭtema klasifiko (malfacila) kaj indeksoj
- Tradicia rolo de proverboj, pragmatiko de proverboj
- Kriterioj de la ĝenro
  - Sabine Fiedler, Mauro La Torre
  - Formaj kriterioj: sintakso, harmonio kaj ritmo
- Moderna utilo
- Klarigo de la indekso de Rogister kaj inversigo

### Proverbaro Esperanta

- Traduko de la verko de Marko Z (kvarlingva kompara frazeologio ru-pl-de-fr), neniam tutece publikigita
- Unua versio (1910/1925): la proverboj/frazeologiaĵoj estas vicigitaj sen videbla ordo, sed la sinsekvaj pecoj ofte rilatas al unu sama temo, fina laŭtema indekso
- Dua versio (1961/1974), sub redakto de C. Rogister: simpla alfabeto listo de 2630 pecoj, fina laŭtema indekso (711 temoj, 15 supertemoj); tre malfacile uzebla indekso, sen klarigoj, malmulte utila; oni ofte bezonus la inversan indekson

### Inversa indekso de Rogister

Mi perkomputile ellaboris la inversan indekson. En ĉi tiu ĉapitro mi provis doni gvidliniojn pri la maniero kompreni la klasifikon de temoj.

### ■ Proverbaro Esperanta

- En la formo de 1910 (helsinki-a universitato)
- En la formo de 1974 (multloke, sed sen la indekso)
- Proverbaro kun inversa indekso de Rogister (mia retejo)

### ■ Studoj, artikoloj

- Golden: artikoloj el Eventoj, Kontakto, IOdE
- Fiedler: resumo de ŝia habilita disertaĵo
- La Torre: artikolo en IPR

### ■ Diversaj

- Ido-proverbareto

Komparo kun idaj proverboj

Ido-lingva malgranda proverbaro (316 frazeologiaĵoj) troveblas en la reto

- Ne estas nur proverboj tradukitaj el E
  - La maxim stulta rurano havas la maxim grosa terpomi.
- La harmoniaj reguloj pli-malpli similas al tiuj de Eo (oftas rimo)

Sed la tradukinto ofte oferis la harmonion

- Malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo.
  - Povreso ne esas krimino, ma duktas a desestimo.
- Inter la blinduloj reĝas la strabuloj. (sufiksrimo, 6-troĥeo)
  - Inter la blindi la strabo esas reĵo. (ne plu estas sufikso, vortordo modifita, eĉ nombro, ritmo oferita)

### ■ Iu volas diri

- Tiu homo aspektas senkulpa, sed li estas ruza (nefidinda)

### ■ Sed li volas paroli en maniero vualita, nereкта

- Aspektas senkulpa, sed estas ruza
- Vizaĝo senkulpa, sed koro ruza
- Vizaĝo senkulpa, sed koro de vulpo

→ *Vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo*

Tradicie, proverboj servas por diri ion, eventuale la propran opinion, sed kvazaŭ ne temus pri io propra. Oni havas katalogon de tutpretaj frazoj kaj ĉerpas inter ili tiun, kiu plej bone aplikiĝas al la nuna situacio. Povas esti, ke oni tion faras por konscie vuali sian opinion, sed foje temas nur pri deziro montri al si mem aŭ al la ĉeestantoj, ke oni komprenas la situacion, ke ĝi estas analizebla.

Tro ofte eblas legi, ke proverboj estas moralaj instruoj, aŭ veraĵoj akceptitaj en difinita socia rondo. Tian rolon ili povas ludi, sed ne nur tian. Tre ofte ili simple servas por komenti iun situacion. Sed kio distingas la komenton proverban de la komento banala? Plej grave ili distingiĝas per formaj trajtoj.

- Aspektas senkulpa, sed estas...: forigo de la subjektoj, tute ne akceptebla operacio en normala lingvaĵo.
- Vizaĝo senkulpa, sed...: enkondukis vortojn kun metafora valoro, forigis verbojn, ŝablono O A, sed O A
- Vizaĝo senkulpa, sed koro de vulpo: plia metaforo, ritmo (kvar amfibraĥoj), mankas nur rimo
- Vizaĝo senkulpa, sed koro vulpa: bela rimo, sed la ritmo lamas
- Plej perfekta estas: vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo



## Kio estas proverbo (2)?

- Semantikaj apartaĵoj (emociaj vortoj, troigoj, metaforoj)
- Sintaksaj apartaĵoj
  - Mankanta artikulado: *formanĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo*
  - Mankanta verbo: *saĝa bundo post la vundo*
  - Mankanta subjekto: *vivis puninde, mortis ridinde*
  - Infinitivo: *memori pri mezuro en laboro kaj plezuro*
  - Kelkaj ŝablonoj
    - O AS, O AS: *malsaĝulo venas, komercisto festenas*
    - O IS, O AS: *mano pekis, dorso pagas*
    - A O, A O: *granda nuboj, eta pluvo*
    - O A, sed O A: *kresko mamuta, sed saĝo liliputa*

### Infinitivo

Ne miksu kun frazeologiaĵoj (tralavi la gorĝon).

### ■ Ritmaj apartaĵoj (piedoj)

### ■ Harmoniaj apartaĵoj

- Ripeto: *granda ofico – grandaj zorgoj*
- Pura rimo: *amo supermezura || ne estas plezura*
- Segmentado
  - *vi ne kredas, || ne aŭskultu, || sed min ne insultu*
  - *komercisto || estas ĉasisto, || li rigardas, || kiu sin ne gardas*
  - *kiu ne akiras, || kiam li povas, || tiu poste deziras, || sed jam ne retrovas*
- Nepura rimo:
  - *langa vundo || plej profunda*
  - *virino bonorda || estas muta kaj surda*

Trisegmentaj: ekzistas ankaŭ pecoj kun tri rimiĝantaj segmentoj: atendis, atendis, ĝis lin ĉerko etendis.

Kvarsegmentaj: rimaranĝo kontinua, alterna. Ekzistas eĉ kruca, sed pro ripeto: saĝa scias, kion li diras – malsaĝa diras, kion li scias.

Parentezo pri seksismo: multaj proverboj aspektas al ni morale ŝokaj hodiaŭ. Du aferoj por ĉiam memori: (1) ili respegulas la soci-ordon de la 19a jc, kaj tiam certe edzo povis diri ion tian al sia edzino, sed ankaŭ patrino al sia filino (tio estis parto de la sociaj roloj ludotaj, same kiel ankaŭ nun ekzistas tiaj roloj, sed malsamaj); (2) ni vidas poste, ke proverbo ne estas nepre obeenda veraĵo: nuntempe tiaj proverboj iĝas tre gravaj armiloj en la buŝo de virinoj (akuzo pri seksismo). Sufiĉas eĉ aludo al ĝi pere de frazo de la tipo: „eble oni ne konsideros min virino bonorda, sed malgraŭ viaj protestoj mi insistas paroli pri tiu ĉi punkto”.

### ■ Por iuj proverboj ekzistas variaĵoj (Z-aj)

- *pli kara estas kap' ol ĉapo, pli kara estas kapo ol ĉapo, pli kara kapo ol ĉapo*

### ■ Eblas modifi proverbon konservante ĝian proverban guston

- *elektadis sen fino, edziĝis kun porkino* (Z)
  - ĉar li elektadis sen fino, li fine edziĝis kun porkino (NE!)
  - *elektadis sen fino, edziniĝis kun porko* (JES!)
- *kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas* (Z)
  - *kie virino ne povas, tien diablon ŝi ŝovas* (B. Golden)

### ■ Eĉ eblas krei tute novajn

- *de Koreio ĝis Ukraini' oni fajfas pri l' Akademi'* (B. Golden)
- *vi ne disponas oron: donu almenaŭ floron* (M. Boulton)

Ni revenu al la formaj apartaĵoj: ili estas ege gravaj. Danke al ili eblas krei novajn proverbojn, kiuj aspektos same aŭtentaj kiel la Z-aj. Oni fojfoje legas, ke proverboj estas frazoj „fiksaj”. Tio estas nur duone vera. Ekz-e: *elektadis sen fino, edziĝis kun porkino* povas fariĝi *elektadis sen fino, edziniĝis kun porko*, preskaŭ sen damaĝo, malgraŭ perdo de la rimo, danke al la sintaksa kaj semantika apartaĵoj kaj al proksimeco kun Z-a proverbo.

Golden en artikolo en IOdE montras, ke oni facile povas krei novan proverbon per simplaj operacioj super jam ekzistanta (eventuale ŝanĝante tute ĝian signifon): anstataŭ la Z-a *kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas* (la virino estas servisto de la diablo), eblas ekz-e diri *kie virino ne povas, tien diablon ŝi ŝovas* (la virino ordonas al la diabloj). Ankaŭ de li estas la fama: *de Koreio ĝis Ukraini' oni fajfas pri l' Akademi'* (speciala ritmo [jamboj/troĥeoj], elizio, rimo, emociaj vortoj).



### ■ Proverbo *ne estas absoluta veraĵo*

- Ĝi povas respeguli ies subjektivan vidpunkton
- Ĝia signifo dependas de la uz-cirkonstancoj

### ■ *Sen mensoga rekomendo ne iros la vendo*

- Diras mastro de la vendejo al siaj dungitoj
- Riproĉas trompita kliento al la vendisto
- Diras la vendisto por pravigi sin
- Admonas amiko de la kliento al ĉi-lastata

### ■ Entute la proverbo povas servi por esprimi:

*ordonon, konsilon, sugeston, averton, riproĉon, sinpravigon, pardonpeton, bedaŭron, supozon...*

### ■ Beletra ĝenro

### ■ Evoluigi la E-an frazeologion (ĉefe por beletraj celoj)

Tirante frazeologiaĵon el proverbo:

- *birdo kantas laŭ sia beko*
- mi faris la taskon *laŭ mia beko*

### ■ Lingvo-instruado

#### ● Kolker

- *afabla vorto pli atingas ol {raporto, komforto, sorto, forto, morto, torto}*
- *amu domon novan kaj amikon...*

#### ● Studado de proverbo

La du unuaj uzoj estas nur potencialaj, sed la lasta vere ekzistas.

Studado de proverbo povas ampleksi multajn aferojn. Ni ekzemple prenu la proverbon *granda telero, malplena kulero*

- Unue oni provu „malvolvi” la sintakson, revortigi la proverbon en pli plata lingvaĵo, rekreante la mankantajn artikulaciajn vortojn: *la telero estas granda, sed la kulero estas malplena*.
- Due eblas peti la lernantojn „malvolvi” la metaforojn, provante igi ilin imagi la bazan situacion, en kiu havus sencon elparoli tian frazon (mi estis invitita por manĝi, rimarkis, ke la teleroj estas grandaj, kvazaŭ la manĝo estus abunda, sed mi ne povis satiĝi), kaj ekstrapoli la metaforan signifon (impresa aspekto, sed seniluziiga realigo).
- Trie eblas peti la lernantojn elpensi situaciojn, en kiuj ili povus uzi tiun ĉi proverbon, kaj montri al ili, ke la celoj ilin uzi estas diversaj (raporto, riproĉo, klarigo...).
- Kvare indas ĉiam peti ilin trovi eventualajn harmoniajn kaj ritmajn specifaĵojn, kio povas servi kiel enkonduko al pli teoria instruo pri rimo kaj metriko.

### ■ *Pelis pavon, falis kavon*

- Signifoj de „peli”: (1) irigi antaŭ si; (2) eksciti al rapida kurado; (3) forkurigi, fuĝigi; (4) kuri por kapti; ...
- Diversaj interpretoj

596. Maltrafo  
596.01 Pafi - maltrafi.  
596.02 Celis paseron, trafis anseron.  
596.03 Pelis pavon, falis kavon.

1884 - Pelis pavon, falis kavon. >> kiel: surprize;  
por kio: celo malica; travivaĵo: malfeliĉo

## ■ Kio estas proverbo?

- Ŝablona frazo kun difinitaj formaj apartaĵoj

## ■ Kiucele uzebla?

- Tradicie, por esprimi sin rilate al iu situacio
- Moderne, por instrui la lingvon

## ■ Materialo el la reto

- Tre abunda

## ■ Daŭrigu la diskuton

- Mia retejo: <http://perso.wanadoo.fr/kursoj/prelegoj/>
- Marc Bavant: mbav (ĉe) uea.org